# *Postulas prezidento de TSE ?iujn fortojn politikajn respekti la rezultojn de la elektoj en Bolivio.*



La Paz, okt 21 (RHK) La prezidento de la Supera Elekta Tribunalo (TSE) de Bolivio, Salvador Romero, postulis ?iujn aktorojn politikajn respekti la rezultojn de la ?eneralaj elektoj de la pasinta 18-a de oktobro, post la mobilizo de kelkaj malkontentaj grupoj kiuj eliris por protekti kontra? la skrutinio.

Dum gazetara konferenco, Romero petis al ?iuj politikaj aktoroj, sociaj kaj regionaj respekti “la rezultojn de la elekto 2020”, post kiam ?i tiu mardo okazis manifestacioj en la departementoj de Cochabamba kaj Santa Cruz.

“La elekta tago estis pura, la kalkulo estas travidebla. Tial, ni petas la civitanaron, al ?iuj agantoj, politikaj,sociaj kaj regionaj, atendi trankvile la fermon de la kalkulado, kiu efektivi?as kun maksimuma travideblo.”, diris la parolisto de la TSE.

Post kalkuldo de 81,76% el la protokoloj flanke de la elekta organo plurnacia (OEP), unualoke estas la Movado Al Socialismo (MAS) per 53,58% de la totalo de vo?oj; sekvas Comunidad Ciudadana per 29,59%.

Kvankam la fakta registaro, la opozicianto Carlos Mesa kaj la internacia komunumo agnoskis la virtualan venkon de Luis Arce, la kandidato de Creemos, Luis Fernando Camacho, eldonis komunikon dirante ke la lando travivas “necertecan momenton” pro la supozata “malbona mastrumo” de la TSE.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/237418-postulas-prezidento-de-tse-ciujn-fortojn-politikajn-respekti-la-rezultojn-de-la-elektoj-en-bolivio

Radio Habana Cuba